

Vorwort von Richard Baum. 3. Aufl. Bonn: Romanistischer Verlag, 239 p.

Postrimarko

Por helpi al informiĝemaj homoj, eventuale pretaj okupiĝi pri sistema terminologia laboro, *Wera Blanke* kaj mi kompilis materialon, kiu reproduktas jenajn publikajojn, indikitajn en la bibliografio:

Blanke, W. (1986, 1987a, 1995);

Dehler, W. (1985c, 1986).

Ili kompreneble aparte redonas la vidpunktojn de TEC kaj neniel pretendas kovri la tutan terenon de la terminologia agado, nek priskribas la diversajn vidpunktojn, kiuj ekzistas pri difinitaj temoj. Por tion esplori ja la bibliografio donas sufiĉe da materialo.

La materialo estas akirebla kontraŭ 4 Internaciaj Respondkuponoj ĉe la aŭtoro.

Adreso de la aŭtoro:

Detlev BLANKE

Otto-Nagel-Strasse 110

DE - 12683 BERLIN

GERMANIO

(Tel. +49-30-5412633; Fakso. +49-30-5456742)

Eventualaj reformoj de la Esperanto-skribo ?

Yannic Gicquel (FR)

ENKONDUKO

De 1887 ĝis hodiaŭ konstante aperis reform-proponoj por la skribo de Esperanto. Nur scienca studado de la problemo alportos validan solvon. Tiun sciencon studon iniciatis *Jon Walter YUNG*, kaj eble nia scienca kolektivo kapablos kontribui al ĝia konkludo.

Kun ĉiu skriba progreso en nia monda civilizo aperis diversaj novaj obstakloj kontraŭ nia lingvo. Multaj el ili iom post iom trovis siajn solvojn. Sed tio ne konsistigis la solvon de NIA skrib-problemo : ĉiam restos kazoj en kiuj, tiuj punktaj solvoj (komputoraj aŭ aliaj) restos neefikaj! Nur filologia solvo povos esti definitiva.

Ni memoru, ke la 26 Latinaj literoj estas monde konataj, dum la 12 Zamenhofaj nenie troveblas. Ili tamen ne resumas la problemon.

IOM DA HISTORIO

"Ĉiuokaze se oni zorge atentus kaj observas la historion de Esperanto, oni konstante kaj en ĉiuj periodoj retrovas la ruĝan fadenon de la bezono reformi la alfabeton kaj la ortografion por la Zamenhofa lingvo!" (Panoramo, p. 1,5).

Zamenhof mem frue ekkonsciis pri la obstaklo, kiun konsistigas lia alfabeto kun specialaj supersignaj literoj. Versajne pli ol unu korespondanto levis antaŭ li la demandon. Sian kolektivon respondon donis la aŭtoro en la *Aldono al la Dua Libro* (Junio 1888, p. 6) : "Se ia el la tipografioj ne povas presi verkojn kun signetoj superliteraj [ĉapelo] kaj [krono], ĝi povas anstataŭigi la signeton (˘) per la litero "h" kaj la signeton [kronon] tute ne uzadi."

Tio fakte estis la *unua reformo* de nia alfabeto. Ĝi estis anoncita en ĉiuj novaj represoj kaj eldonoj de la "Unua Libro" kaj pro tio fariĝis normala parto de ĉiuj eldonoj de la *Fundamento*. Praktike neniu uzis ĝin!

Poste Zamenhof proponis alian alfabeton multe pli simplan sed en la kadro de plena reformo de la lingvo (1994). Ĉi-okaze li skribis: "En la ĝisnuna alfabeto de nia lingvo la praktiko montris la sekvantajn maloportunaĵojn: 1) *Signoj superliteraj*. Tiu ĉi punkto, kiu siatempe en la teorio ŝajnis tute sensignifa, en la praktiko montris sin kiel tre grava barilo por la disvastigado de nia lingvo". (Panorama, p. 1,6).

Tiun reforman lingvon rifuzis la tiamaj esperantistoj!

Pli poste sub la influo de Franco, D-ro Émile Javal, lia amiko kaj kunfrato, Zamenhof proponis en konfidencaj leteroj al la Akademio, ke y anstataŭu j. Tio ne havis sekvojn.

Tamen D-ro Javal publiikigis broŝureton sub la titolo *Fonetika Skribado por enpresigoj en ne-Esperantistaj Gazetoj* (1907). Tiu teksto estas reproduktita kun transskribo al la sistemo de la aŭtoro (Panorama, p. 1,33 k.skv.). Ĝi aspektis tre moderna: *ch, j, kh, j, sh, u* – plus *y*. Tamen ĝi konfuzis ĝ kun j.

"Iom antaŭ la dua Mondmilito [Jaime Grau Casas, redaktoro de la Kataluna Antologio] organizas tutan kampanjon kun poŝtkartoj kaj satiraj versaĵoj..." (Panorama, p. 1,9). Li proponis: *ch, tj, k, j, x, w* – plie *y* por *j*.

Tuj post la dua mondmilito iu Usona pastro, John KUBACKI, organizas kampanjon de presitaj cirkuleroj, kiuj emociigas ĉiujn (Panorama, p. 1,9). Kun propraj neologismoj (i.a. *i = kaj*) li skribas:

"La 'q' i la 'x' xaynas iom strange, ye la unua aspekto, sed tiuj du literoy de la angla alfabeto estas la SOLAJ uzeblay anstate la supersignitay 'ĉ' i 'ŝ', qar la aliy literoy estas uzatay por siay propray sonoy en la angla i la esperanta alfabeto. Ili estas PRETAY, oni ne bezonas KREI i fandi novayn monstraĵoy. Ili estas tiel tawgay i senlime pli belay ol la supersignitay." (Panorama, p. 1,42 k.skv.).

Tio estas rigora apliko de la principo de *Port-Royal* ("unu litero – unu sono"), kiu elvokas la protestojn de Kalocsay kaj aliaj.

Okaze de tiu Kubacki-kampanjo iu Germano, Teo Jung, fondinto kaj redaktoro de *Heroldo de Esperanto*, revuas (Panorama, p. 1,35 k.skv.) la aperintajn sistemojn kaj donas la propran: *ch, dj, k, sh, j, u* – plie *j* iĝas *y* aŭ *i*.

Ankaŭ li levas la demandon pri la konfuzeblo de *j* al *ĝ* pro "tio, ke la sono *j* aperas nur en dekduo da vortoj kaj en la sufikso -aj-!"

Sed li precipe difinas la nocion de *allogaj vortbildoj* (Panorama, p. 1,39). Ĝi estas reago al la simplismo de Kubacki, kiu por fonemo proponas unu el la kvar disponeblaj literoj (*q, w, x, y*), ne zorgante pri ĝia internacie konata valoro. Versajne pro la sofismo, ke litero fremda al E-o povas alpreni kiun ajn valoron, "ĉar ĝi havas neniun!"

Fama Hungaro, Kalmán Kalocsay, esprimas la saman nocion, kiel Teo Jung (Literatura Mondo, 1948, p. 92), dirante: "Mi vetas, ekzemple, ke en Esperanto neniam oni skribos: *tsivilizatsio* aŭ *txirkawayo*". (Panorama, p. 1,44). Ankaŭ li havas sian proponon: *ch, gh, ? , y, sh, w*.

30 jaroj post Teo Jung sed sendepende de li, iu Finna universitatano, Prof. Vilho Setälä, alvenas al simila propono: *ch, dj, k /h, j, sh, u* – plie *y/i*. Plurajn broŝurojn li eldonas (1979-80) en kunlaboro kun sia Sveda kolego, Björn Collinder. Ankaŭ li estas Akademiano, same kiel Zamenhof, Javal, Grau Casas, Kalocsay kaj Teo Jung.

Ankoraŭ 30 jaroj poste aperas Franco, Jon Walter YUNG, orfa filo de paro Germana-Brita, kiu ermite vivis pro sia sano. Li dediĉis parton de sia vivo al Esperanto kaj ties skribo. Kun du amikoj (Christian Pradelet kaj la aŭtoro, Yannic Gicquel) li fondas la *Union por Nova Alfabeto*, kiu dum 2-3 jaroj intense studas la problemojn ligitajn al la reformo de la ortografio kaj entreprenas tutan serion da eksperimentoj! Bedaŭrinde Yung mortas post rapida malsano. Sur sia mortlito li donas al mi diversajn instrukciojn por daŭrigi la laboron. Pradelet foriris al ekzotaj landoj.

Mi do, lia lernanto kaj disĉiplo, restas por alfinigi la taskon. Post kvar jaroj mi sukcesas aperigi la *Panoramon de la Universala Skribo*, kolektivian verkon de la Unio, sed ĉefe verkon de Jon Walter YUNG. Mi ankaŭ aperigas ses numerojn de bulteno dediĉita al la *Universala Alfabeto* kaj al la memoro de la fondinto.

La sesa bulteno alvenigas sufiĉe abundajn rimarkojn de diversaj legantoj. Pli ol unu protestas kontraŭ la uzo de la paro *y/i*, kiu efektive en Esperanto konsistigas la Zamenhofan fonemon *j* ! Pro tio ni didaktike prezentas du formojn de la Universala Alfabeto en inversa ordo.

EKVIDO AL LA REZULTANTA ALFABETO

Dua formo de la Universala Alfabeto.

1.- Kiel bazon ni prenu la *Fundamentan surogatan H-alfabeton* ! T. e. *ch*, *gh*, *hh*, *jh*, *sh*, *u*. Tiuj grafismoj ja egalas al : *ĉ*, *ĝ*, *ĥ*, *ĵ*, *ŝ*, *ŭ*.

2.- Ni konservu 4 el tiuj 6 literoj/digramoj. Nome, *ch*, *jh*, *sh*, *u*.

3.- Ni adoptu la literon *y*, kiu valoru la ĝisnunan *j* en ĉiuj kazoj.

4.- Ni adoptu la tiel liberigitan literon *j* por la valoro de *ĝ*.

5.- Ni akceptu la digramon *kh* por la valoro de *ĥ*.

Unua formo de la Universala Alfabeto.

La punkto 1.- restas sensanĝa. En la punkto 2.- forigu la digramon *jh*. La punkto 3.- *fariĝas* : Ni enkonduku la literon *y*, kiu valoru nur la antaŭ- aŭ la inter-vokalan *j*. Sed *i* notu la postvokalan *j*. La punkto 4.- restas sensanĝa. Kompletigu la punkton 5.- *jene* : kaj ankaŭ la digramon *zh* por la valoro de *ĵ*. Fine aldonu ĵenan punkton : 6.- Ni kompletigu la alfabeton per la tri literoj *q* [k], *w* [w], *x* [ks] kaj per la du digramoj *qu* kaj *xz* kun la valoro de *kv* kaj *kz* respektive.

Tabelojn pri la *Universala Alfabeto* vidu en Panoramo (p. 7,9 k.skv.).

SCIENCA STUDO

1. FONETIKAJ SISTEMOJ

Jon Walter YUNG bazis grandan parton de sia reserĉo-labore sur la komparo de ses fonetikaj sistemoj. Tiuj ses sistemoj estis la jenaj :

1. *La Internacia Fonetika Alfabeto* (IFA);

2. *La Norma Alfabeto (Standard Alphabet)* (SA) de Richard Lepsius;

3. La alfabeto de la *International African Institut* (IAI), Londono;

4. La alfabeto de la *Institut d'Ethnologie* (IE);

5. La alfabeto de la *Institut Géographique National* (IGN);

6. La alfabeto de la *Permanent Committee of Geographic Names* (PCGN).

– IFA estas vaste konata kaj uzata. De ĝi defluas multo de la kvar lastaj. Ĝi rigore aplikas la *principon de Port-Royal* (unu signo = unu sono) kaj inventis multajn grafemojn por reprezenti diversajn sonojn de plej diversaj lingvoj.

– SA, pli frue aperinta, estas apenaŭ konata (Lepsius, 1981). Ĝi uzas seriojn da diakritoj por sisteme modifi la ĉefajn grafemojn. Karakterizas ĝin la maniero malsame trakti la Slavajn lingvojn disde ĉiuj aliaj : la palatala frikativo estas notata *y* en ĉiuj lingvoj (*ya*, *ye*, *yi*, *yo*, *yu*), sed en la Slavaj, ĝi estas notata *j* (*ja*, *je*, *ji*, *jo*, *ju*). Plie en SA tiu Slava *j* krome utilas por noti la kurtan vokalon en diftongoj (*aj*, *ej*, *ij*, *oj*, *uj*), notata en IFA per *i* (*ai*, *ei*, *ii*, *oi*, *ui*). Fakte tiu *j* de SA identas al la *j* de la Slavaj lingvoj mem.

– La tria sistemo, IAI, estas iu IFA modifita por uzado en la Afrikaj lingvoj. Pri ĝi donas aludojn *Cohen* (1958). La ĉefa diferenco estas, ke la *j* de IFA estas anstataŭigita de la pli internacia *y*. Efektive en tiu funkcio neniu ĉeflingvo en Afriko (la okcidentaj Angla, Franca, Hispana kaj Portugala) uzas la literon *j*, sed ja *y* aŭ *i* ! Cetere la transskribo de la Araba ankaŭ uzas *y*, kvankam en ĉiuj pozicioj. Sed IAI kiel IFA uzas ordinaran *i* por la kurta *i*.

– La tri lastaj sistemoj, pri kiuj bone informas dokumento de *Nations Unies* (1969), same derivas de IFA sed ŝajne tra la Afrika sistemo : ankaŭ ili uzas *y* por la *j* de IFA. Tiuj tri sistemoj starigitaj de tri sciencaj institutoj, du geografiaj kaj unu etnologia, el kiuj unu Brita kaj du Francaj, tre grave rolis en la tiamaj Afrikaj koloniaj imperioj. Ilia tasko estis fiksi la ortografiojn de toponimoj. Per la forto mem de la aferoj ili starigis la alfabetojn de la koncernaj etnaj lingvoj.

Jon Walter YUNG sisteme vastigis siajn komparojn al la ĉefaj trans-literigoj (Rusa, Nagara, Araba kaj Greka) (Panoramo, p. 3,3).

El la komparo de tiuj ses alfabetoj defluas serion da konstatoj, kiuj ebligas konstrui racian alfabeton. Do, post 1.- *fonetikaj sistemoj*, ĵus studitaj, ni sinsekve studos : 2.- *la kerno de la nova alfabeto*; 3.- *la konsonanta kerno*; 4.- *la vokala kerno*; 5.- *la digramoj*; 6.- *necesoj de Esperanto*; 7.- *Latinaj literoj q, w, x*; 8.- *monda lingvo-dispartigo*.

La aŭtoroj (Panoramo, p. 3, 42) tre konscias, ke *"ĉiam restos iom da arbitreco : pluraj solvoj estas konstrueblaj surbaze de la supraj konsideroj akcepteblaj de la granda plimulto. Povos ŝanĝi ilin nur punktaj informoj pri eventualaj aliaj ebloj. . . ."*

Tio ĵus okazis koncerne al grava punkto de tiu konstruado, nome al la kerno ! La restanta aŭtoro, *Yannic Gicquel*, agnoskis tion kaj poste decidis prezenti tiun kernon sub siaj du formoj : tri- kaj du-grafema!

2. LA TRI- AŬ DU-GRAFEMA KERNO DE LA NA

La trigrafema kerno. La Unio por Nova Alfabeto ĉirkaŭ sia fondinto agnoskis kiel evidenta, ke la kerno devas esti *"la adopto de y kaj do la liberigo de j, kiu litero utilu en tre oftaj vortoj kiel 'ĵi, ĵis, ĵi' . . . ni adoptu ankaŭ la kurtan i, kiel duan vokalan elementon de la diftongoj ai, ei, oi . . ."* (Panoramo, p. 3,42).

La Unio komfortiĝis en sia opinio, ĉar ĝi konstatis, ke pli ol unu el la Afrikaj lingvoj kaj ankaŭ aliaj sekvis tiun skemon ! Per elekto de tiu tri-grafema kerno estis establita simileco inter la nova alfabeto kaj la alfabetoj de tuta serio da lingvoj. Plie tiu *trigrafema kerno* ofte sufiĉis por praktike transskribi tutan tekston. Ekz-e, *la Esperon* de Zamenhof (Panoramo, p. 0,9). Fine la skribo ŝajne estis ofte pli konforma al tiu de la okcidentaj etimoj.

Ke multaj lingvoj sekvis tiun skemon, tio ebligis proponi la difinon de *Komuna Internacia Alfabeto !* Nome, alfabeto prezentanta la trigrafeman kernon, nome, *y*, *kurta i* kaj *j* valoranta laŭ la lingvoj aŭ [g] aŭ [dg]. En Esperanto tiu *j* valoras [dg], ĉar ĝ en tekstoj estas sesfoje pli ofta ol *j* (Panoramo, p. 3,38 kaj p. 3,50).

La dugrafema kerno. Sed aperis kontestantoj : la finofara argumento estis, ke la efektive duprononca Zamenhova *j* konsistigas nur unu fonemon kun du alofonoj en komplementa distribuo ! Unuvorte y estu identa al la Zamenhova *j*.

Tio neniel estis la fino por la *Universala Alfabeto !* La kolektiva verko de la Unio restas valida, ĉar ĝi ne estas ligita al la detalaj formoj, kiujn fine elektis *Jon Walter YUNG* kaj liaj disĉiploj. La fondinto eĉ ekvidis sur sia mortlito, ke li eble eraris; efektive li konfesis : *"Eble mi tro atentis pri la Internacia Fonetika Alfabeto !"* Se li vivus, li povus mem konstati tion kaj pri-eksperimenti ĝin !

La konsekvencoj ne povis manki ! Ili estas ligitaj al la unufonemeco de Zamenhova *j*. El la nova ortografio radikale malaperas la *tremaa ĵ*, kiun la Unio praktike ne uzadis, sed kiu riskis esti ŝtono de stumblado por la lernantoj. Malaperis ankaŭ la neceso enkonduki drastan pedagogion por instrui la du finaĵoj de infinitivo (-i) kaj de pluralo (-oi, -ai, -ui). La kutima pedagogio sufiĉos por la dugrafema kerno.

Sed kompanse oni perdis la avantaĝojn de la trigrafema kerno : la pli grandan similecon kun la ortografioj de diversaj nove alfabetitaj lingvoj; la pli grandan similecon kun la okcidentaj etimoj. Unuvorte malpli bona skrib-aspekto pagis la pli grandan respekton al fonologio !

Pro tio necesas studi kun la uzantoj, kiu formo estas optimuma !

3.- LA KONSONANTA KERNO

Se oni komparas la ses fonetikajn alfabetojn, oni rapide konstatas, ke *15 konsonant-grafemoj* fonetike identas en ĉiuj alfabetoj. Ili estas :

b, d, f, g, h, k, l, m, n, p, r, s, t, v, z

Ili konsistigas la *"konsonantan kernon"* : en la ses sistemoj ili havas la samajn valorojn kiel en la Zamenhova ortografio. Tiujn valorojn do prioritare respektas la *Universala Alfabeto*.

Male, ne identas en la ses fonetikaj sistemoj, nek en la Zamenhova alfabeto, la du literoj *c* kaj *j*. Pri *c* vidu en punkto 6; pri *j* en 2.

4.- LA VOKALA KERNO

Ni diros nur, ke ĉiuokaze ĝi ne povas esti io alia ol *a, e, i, o, u !*

5.- LA DIGRAMOJ

Lastanalize la ekzistantaj digramoj rezultas el la iniciato de Gallo-Romanoj kaj el ilia evoluigo far Francoj kaj Angloj (Panorama, p. 3,15 k.skv., laŭ *Albert Dauzat*, 1988, p. 1686 k.skv.)

La Latina *c* [k] en difinitaj cirkonstancoj fariĝis *sibla afrikato* [ts], kiu en la Gallo-Romana evoluis al *ŝuŝa afrikato* [tʃ]. Tiun oni bezonis grafisme distingi kaj ĉar *h* delonge estis muta litero, oni kreis la grafismon *ch*, valoranta [tʃ]. Tiu unue transiris al diversaj lingvoj (ĉefe al la Angla kaj la Hispana).

En la Franca, sekvata de diversaj lingvoj, tiu *ch* [tʃ] sone evoluis al [ʃ], dum la grafismo restis. La Angloj, laŭ *ch* plu valoranta [tʃ], kreis la grafismon *sh* por noti [ʃ], kiun enportis vortoj de Germana etimo.

En la 20-a jc. Anglaj lingvistoj kreis *zh* por noti [z] kaj *kh* por noti [x] de fremdaj lingvoj (ĉefe el Rusa kaj Araba skribo). Tiam ili ne memoris, ke Francoj por la sono [z] pli frue kreis *jh* por skribi *Jhesus*, *Jherusalem* (Panorama, p. 3,50). Efektive tiu *jh* [z] simpliĝis al ordinara *j*, tuj kiam oni ne plu riskis konfuzon kun la Latina *j* [j].

Tamen pretervidiĝis la ambiguo naskotaj de la fakto, ke en multaj okcidentaj kaj orientaj lingvoj *ch* plie notis la Grekan *khi* [x]. Tiu *ch* prononciĝis [k] okcidente, sed [x] oriente.

La *Panorama* klarigas ĉi ĉion kaj samtempe detaligas la uzon de diversaj lingvoj kaj transliterigoj, dank'al kio eblas paroli pri la internacieco de tiuj digramoj.

6.- NECESOJ DE ESPERANTO

Ni parolos pri du necesoj : la pli ofta ĝ; la sono de *c*.

1.- Necesoj estas la prioritato donota al la litero ĝ antaŭ la litero *j*, ĉar en teksto renkontiĝas ses literoj ĝ por unu *j* !

Teorie oni povis transdoni *j* per ordinara *j*, kaj sekve ĝ per la digramo *dj* (*dji*, *djis*, *djardeno*).

Alia eblo estis rezervi la simplan grafemon *j* al la litero ĝ (*ji*, *jis*, *jardeno*) kaj elserĉi alian grafismon por la malpli ofta *j* ! Inter la eblaj grafismoj por *j* ni jam vidis *zh* kaj ankaŭ *jh* : la unua estas pli "fonetika" kaj memorigas la Slavajn *ž* (*zhurnalo*). Plie tiu digramo *zh* estas uzata en diversaj transliterigoj (Rusa, Persa).

Apud la paroj *c* – *ch*, *s* – *sh* ĝi formas trian paron *z* – *zh* ! Per tio oni povas diri, ke tiuj ses grafemoj pli koheras inter si.

Aliflanke la grafemo *jh* havas la avantaĝojn iam esti uzata de Francoj kaj per si mem memorigas la elekton, kiun faris Zamenhof mem ! Same kiel li uzis *z* en sia Pra-Esperanto, li certe estus povinta elekti *z*, tute simila al la Slava *ž*, apud *č*, *š* similaj al niaj *ĉ*kaj *ŝ* respektive. Sed li elektis *j*, kiu do estas evidenta koncedo al la Franca lingvo. Cetere el tiu lingvo li prenis plurajn vortojn (*journalo*, *korsajo*, *jeti* . . .).

Do uzi la skribon *jh* signifus respekti la Zamenhofan elekton. Dum *zh* estas neŭtrale fonetika! Plie *jh* apartenas al la *H-alfabeto* de la Fundamento. Ne multe pezas tiu argumento krom per sia propra pezo !

2.- Ni nun elektu la valoron de la litero *c*, kiu ne apartenas al la *konsonanta kerno*. En diversaj alfabetoj kaj transliterigoj ĝi ofte havas la valoron [ʃ] aŭ [tʃ]. Iuj reformistoj sekve proponis *c* aŭ *tc* por nia *ch* ! Sed ili ne atentis pri la rezultantaj vortbildoj, des pli ke la ĵisnuna *c* fariĝas *ts* !

Krom se ni entreprenus pliajn reformojn por tuta serio da vortoj, ni devus skribi *tsedro*, *tcerpi*. Jam *Kalocsay* avertis, kiel ni diris pli supre, kontraŭ grafismojn, kiaj "tsivilizatsio aŭ txcirkawayo".

Ni do konservu por *c* la valoron, kiun Zamenhof elektis ! Ĝi cetere aperas en la digramoj *kc* kaj *sc*, kiuj estas oftaj en nia lingvo. Ne penseblaj estus : *aktseĵi*, *stsientso* : ili postulus pliajn reformojn.

Oni notu, ke la valoro [ts] ekzistas en ĉiuj Baltaj kaj Slavaj lingvoj. Plie la Ĉina *c* praktike havas la saman valoron (*Yang-ce*).

7.- LA LATINAJ LITEROJ Q, W, X

Diversaj reform-proponoj volis uzi la ceterajn Latinajn literojn por anstataŭigi la supersignajn. Sed per tio oni senmanke kreis malbonajn vortbildojn : la Latinaj literoj havas valorojn internacie konataj. La Akademio agnoskis tiujn valorojn (AKTOJ III) ! Ni re-sendas al tiu loko.

Sed en la Universala Ortografio jam estas elektita *y = j* ! Do restas nur la tri literoj *q*, *w*, *x*, kiuj – se estos decidite, ke ili eniru en la alfabeton – povos havi nur la aluditajn valorojn. Ni alvenas al jeno :

1. - $Q = k$. Oni ne bezonas ĝin en Esperanto mem. Sekve ĝi maksimume povas utili por konservi propran nomon, kiu estus skribita aŭ transliterigita per tiu litero. Tio estas la kazo de Arab-skribaj nomoj : q tiam reprezentas ian k -similan sonon. Ekz-e, *Qorano, Iraĝo* . . . Oni ankaŭ aludis pri Ĉinaj nomoj : *Qingdao*, asimilita al *Kingdao* en PIV. Sed nur specialistoj povos diri al ni, ĉu tio estas legitima.

Ni devas diskuti ankaŭ pri ofta digramo trovebla en preskaŭ ĉiuj Eŭropaj lingvoj : nome, $qu = kv$. Ekzistanta en ĉiuj Latinidaj, la Angla kaj la Germana, ĝi troviĝas parte ankaŭ en iuj Skandinaviaj. Eblus per ĝi doni pli allogan vortbildo al vortoj je kv : *quera* (Germana *quer*), *quadrato* (*Quadrat*), *quadrigo* (*Quadriga*) . . . Nur necesus lerni, ke qu estas *konsonanta digramo*, en kiu u ĉiam estas senakcenta !

Nur tiujn du punktojn oni povus proponi, por ke la litero q apartenu al la alfabeto ! En la civilizo de morgaŭ ankaŭ tiu litero ne manku pro ĝia uzado en sciencoj kaj teknikoj : ĝia enalfabetigo dezirindas.

2. - W . Ni povas reteni por tiu litero nur ĝian IFA-valoron [w] ! Ĝi troveblas ne nur en la Angla, sed ankaŭ en plimulto da lingvoj el Afriko, Azio kaj Oceanio.

Laŭ iuj ĝi konsistigus nur unu fonemon kune kun $ŭ$. Ne estas tiel ! En Esperanto $ŭ$ ekzistas nur en la diftongoj *aŭ, eŭ* kaj en la malofta *oŭ*. Ĝi ja estis elektita de Zamenhof por skribi tiujn diftongojn. Ili respondas al nacilingvaj diftongoj skribitaj jene : *au, eu, ou* . . .

Aliparte Zamenhof avertis kaj en la Fundamento kaj en privataj leteroj, ke oni ne konfuzu $ŭ$ kun la Angla w ! Tradicie oni transskribas ĝin per v . Sed por transskribi pli ĝuste nomojn, kiuj entenas ĝin, oni simple konservu tiun literon mem ! Ekz-e : *Wellington, Wakanawa* . . . *watto, maxwelo* . . . Sed ne pensebla estus, ekz-e, *awtoritato*, kiu fremdus al ĉiuj okcident-Eŭropaj lingvoj ! La vortbildo estus malbona !

3. - $X = ks$. Tiu litero estas konata de ĉiuj okcident-Eŭropaj lingvoj. Ekz-e, la vorto *texto* kun aŭ sen finaĵo troviĝas en ĉiuj Eŭropaj lingvoj, escepte en la Itala *testo*. En la Slavaj ĝi uzas *ks* (Pola *tekst*).

La argumento, ke temas pri duobla sono $k + s$, ne estas tenebla apud $c = t + s$. La enpreno de litero x malgravigus la opinion de multaj, kiuj riproĉas al nia lingvo simili al iu fonetika skribo. Ĝi per tio mem pli similus al Latinida lingvo, kia ĝi mem estas.

Apud la pli oftaj ks , ekzistas en nia lingvo digramoj kz . Tiu digramo estis enkondukita de Zamenhof por respekti la duoblan prononcon, voĉan kaj senvoĉan, de x en pluraj okcidentaj font-lingvoj. La prononco de tiu digramo pli ĝuste estas gz ! Ŝajne oni devus redoni ĉiujn x ankaŭ per x en Esperanto ! Sed se la plimultaj valoras [ks], kiel do oni scios, ke iuj valoras [gz] ? Ekzistis tri solvoj (Panoram, p. 3,47) :

1) Aŭ ĉiuj ks kaj kz fariĝos x kaj prononciĝos [ks];

2) Aŭ nur ks fariĝos x ; sed kz ne modifiĝos;

3) Aŭ apud la grafismo x por ks , ni adoptos alian grafismon, kiu entenos x kaj estos prononcenda gz ! Tute nature aperas la digramo xz !

Per tiuj tri solvoj por q, w, x ni povos konservi en nia alfabeto tiujn tri Latinajn literojn, el kiuj du datumas de la klasika epoko kaj ankoraŭ gravas hodiaŭ : ili tri ĉiupaŝe estas uzataj en nia civilizo.

Tamen ni agnosku, ke ili ne estas esencaj por la konsiderata reformo de nia alfabeto. Kompense eventuala reformo ne estas nepre necesa por enkonduki ilin ! Temas preskaŭ pri du malsamaj klopodoj !

8.- MONDA LINGVO-DISPARTIGO

La kvar kvaronoj. - *Jon Walter YUNG* kutimis paroli pri la kvar kvaronoj, inter kiuj estas dispartigitaj la lingvoj de la mondo (Panoram, ĉap. 2.8.) : *la unua kvarono* (la Angla kaj la Latinidaj); *la dua kvarono* (la nove alfabetitaj lingvoj de Afriko, Oceanio kaj Azio); *la tria kvarono* entenanta mem kvaronon (Baltaj kaj Slavaj) kaj la ceteron, kiu kune kun *la lasta kvarono* formas tuton (ali-skribaj lingvoj). Tiu prezento, kvankam tre bildiga, estis iom tre skema.

La sektor-grafiko. - *Yannic Gicquel*, uzanta klasifikon de *Jon Walter YUNG* kaj laŭ ties mendo, studis pli taŭgan dispartigon reprezenteban per sektor-grafiko (Vd. p. 27).

La klasifiko de *Yung* concernis la kvar grupojn de Latinskribaj lingvoj kiujn li distingis laŭ la maniero transkribi la du Esperanta-jn vortojn *jes, kaj* (Panoramo, p. 1,4) : 1-a grupo (*jes, kaj*) Balto-Slavaj lingvoj, kelkaj Germanidaj kaj aliaj, plus Esperanto = **Sektoro 2** (2,1 %) – 2-a grupo (*jes, kai*) Germana lingvo, kelkaj Germanidaj, plus la Internacia Fonetika Alfabeto = **Sektoro 1** (2,7 %) – 3-a grupo (*yes, kai*) lingvoj nove alfabetitaj en la 20-a jarcento, plus la propono de *Jon Walter YUNG* = **Sektoro 4** (7,8 %) – 4-a grupo (*yes/ies, kai/kay*) la Angla kaj la Latinidaj lingvoj = **Sektoro 3** (29,0 %).

Restas la **Sektoroj 5 kaj 6** : la **Sektoro 5** reprezentas la Ĉinan lingvon (23,3 %). Tiu okupas interesan situacion, ĉar la Ĉina posedas ideografian skribon, al kiu nun aldoniĝas la Latina skribo (la "pinyin"). La **Sektoro 6** reprezentas la aliajn ne-Latinskribajn lingvojn (35,1 %).

La unua konstato estas pri la Zamenhofa litero *j*. Tiu litero troviĝas en la **Sektoroj 1 kaj 2** sed ne en la aliaj (ĉefe ne en 3 kaj 4 sed ankaŭ ne en 5 : Ĉina "pinyin"). Tio respondas al 2,1 + 2,7 % de la lingvoj kontraŭ 29,0 + 7,8 = 36,8 % : do granda plimulto de la lingvoj ne uzas la literon *j*, kiel en la Zamenhofa skribo. Kaj nur entute 2,1 % uzas ĝin tute kiel en tiu skribo, t.e. en ĉiuj pozicioj. Tio estas apogo ĉefe al la *trigrafema kerno*.

En sia studo pri la relativa valoro de la kolektitaj nombroj *Yannic Gicquel* interalie diskutas pri la nuna disvastiĝo de *pinyin* kaj montras, ke laŭ la ekspansio de tiu Latina skribo la procento de Latinskribaj lingvoj varias inter *infra limo i* ĝis *supra limo s* valorantaj respektive *i* = 41,6 % kaj *s* = 64,9 % (vd. la sektor-grafikon : Panoramo, p. 2,39; vd. ĉi tie sur p. 27).


La **Sektoroj 1 kaj 2** formas supergrupon **O** de la Orient-Eŭropaj lingvoj, kiuj uzas la literon *j* kiel en Esperanto (2,1 %) aŭ kiel en IFA (2,7 %) !

La **Sektoro 3** dividiĝas al du ne desegnitaj sektoroj **L kaj D** : la Latinidaj lingvoj kaj la Angla (**L**) estas la ĉefa parto (21,3 %), dum la parto **D** (7,7 %) aludas pri diversaj lingvoj ĉefe Afrikaj sed ankaŭ aliaj.

"Principe tiuj lingvoj are estus de la tipo *yes, kai* de la nove alfabetitaj lingvoj. Sed por esti certa pri tio por ĉiu el ili aparte, necesus enketi pri ĉiu el ili aparte. Pro tio ni preferis grupigi ilin en la

Lingvo-dispartigo tra la mondo

Sektor-grafiko pri la skribodispartigo de la lingvoj en la mondo



Legendo : Lingvoj **1.** IFA-ecaj : 2,7 % – **2.** Zamenhofecaj : 2,1 % – **3.** Latinidecaj : 29,0 % – **4.** OU-ecaj : 7,8 % – **5.** Ĉinaj : 23,3 % – **6.** Ne Latinskribaj : 35,1 %.

Sektoro 3 (= L + D). Tamen ni estas konsciaj, ke granda parto de tiuj 77 % (sektoro D) devus aliĝi al Sektoro 4 (nove alfabetitaj), kaj tiel kreskigi tiun sektoron ĝis maksimume 15,5 %." (Panoramo, p. 2,38).

Fine la ne desegnita sektoro C (de pinyino) montras parton de Sektoro 5, kiu estas evoluanta de 0 ĝis 23,3 %. Do la Sektoro 4 kreskos pro aldono de la du sektoroj D kaj C : t.e. de 7,8 % al maksimume 38,8 %.

Sume la sektor-grafiko, donante pli nuancajn nombrojn, konfirmas la proksimuman ĝustecon de la prezento de *Jon Walter YUNG!*

KONKLUDO

Ni estas antaŭ pluraj ebloj reformi la ortografion de Esperanto. Tiuj ebloj povas esti konsiderataj kiel la diversaj kombinoj de kelkaj partaj reformoj. Tiuj partaj reformoj aŭ eskudas, aŭ komplementas unu la alian. Ili estas :

1. - **A.** **Ĉ** la trigrafema kerno (*y/i kaj j*),
B. **Ĉ** la dugrafema kerno (*y kaj j*);
2. - **Plus** la tri digramoj *ch, sh, kh*;
3. - **Plus** : **C.** **Ĉ** la digramo *zh*,
D. **Ĉ** la digramo *jh*;
4. - **Plus eventuale** unu, du aŭ tri el la Latinaj literoj : *q, w, x*.

La definitiva alfabeto estos tiu preferata de la plimulto. Ĉiokaze la alfabeto respondos al la Zamenhofa, respektos la fonologion de la lingvo kaj ebligos ia dudirektan transalfabetigon aŭtomatan. Vidu : "*Komputore asistata transalfabetigo*" (Panoramo, p. 5,21 k. skv.).

BIBLIOGRAFIO

AKADEMIO DE ESPERANTO. - *Aktoj de la Akademio III, 1975 - 1991*. - Rotterdam, Paris : UEA, SAT, (1992). 79 p. [vidu p. 76].

COHEN, Marcel. - *La grande invention de l'écriture et son évolution*. - Paris : Klincksieck, 1958. XII + 471 + 228 p. + 95 kliŝaĵoj.

DAUZAT, Albert. - *Nouveau dictionnaire étymologique et historique*. En : *Nouveau Dictionnaire Encyclopédique Larousse Sélection*. Paris : Sélection du Reader's Digest, 1987. 2015 p. [Tome 2 ekde p. 1670 : vidu p. 1686 k. skv.].

JAVAL, Émile. - *Fonetika Skribado por enpresigoj en ne-Esperantistaj Gazetoj*. - Dijon : Barbier-Marillier (pres.), 1907. 8 p.

LEPSIUS, Richard. - *Standard alphabet for reducing unwritten languages and foreign graphic systems to a uniform orthography in European letters*. - 2nd revised edition (London, 1863) edited with an introduction by J. Alan KEMP, University of Edinburgh. Amsterdam : John Benjamins, 1981.

NATIONS UNIES. - *Conférence des Nations Unies sur la normalisation des noms géographiques*. - Genève, 4 - 22 septembre 1967. Vol. 2. Travaux de la Conférence et documents techniques. New-York : Nations Unies, 1969. VI + 163 p.

SETÄLÄ, Vilho, COLLINDER, Björn. - *Fundamenta Esperanto sen supersignoj*. - Helsinki : (Setälä), 1979. 20 p.

YUNG, Jon Walter . . . - *Panoramo de la Novaj au Universala Alfabeto kaj Ortografio por la Zamenhofa Lingvo*. Tuluza : AEIOU, 1995. 336 p.

ZAMENHOF, L. L. - *Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo internacia*. - Varsovio : Kelter, 1888.

ZAMENHOF, L. L. - *Pri reformoj en Esperanto. I. Alfabeto*. - En : *La Esperantisto* 1894 : n-ro 1, 15-a Januaro, p. 4-5.

ZAMENHOF, L. L. - *Fundamento de Esperanto. 9-a eld. kun enkondukoj, notoj kaj lingvaj rimarkoj de Albault*. Marmande : EFE, 1963. 355 p.

Adreso de la aŭtoro:
Yannic GICQUEL
B.P. 2032 AEIOU
FR - 31017 TOULOUZE CEDEX 2
FRANCIO